

**INTERNACIA FERVOJISTO**  
60-a eldonjaro

Dumonata fervojfaka revuo en  
Esperanto kaj organo de  
**Internacia fervojista**  
**Esperanto-Federacio**

**Prezidanto:** Romano Bolognesi  
Via Misa 4  
IT-40139 Bologna, Italio  
"co16919@iperbole.bologna.it"

**Vicprezidanto:** István Gulyás  
Rákos u 98  
HU-1155 Budapest, Hungario  
"kozsu13@freemail.hu"

**Sekretario:** Marica Brletić  
Peruanska 12  
HR-10090 Zagreb  
"marica.brletic@hznnet.hr"

**Kasisto:** Laurent Vignaud  
3 Allée du Haras, App 132  
FR-49100 Angers  
Tel: +33 (0)2 41 20 19 40  
"laurent.vignaud@free.fr"

**Redaktoro:** Jean Ripoché  
5 Allée Morillo  
FR-44300 NANTES  
France  
Tel/fakso + 33 (0)2 40 50 57 43  
"jeanripoché@wanadoo.fr"

**Franca poŝtĉekkonto:**

**Atentu:**

Ĉekoj aŭ ĝiroj al "**Laurent Vignaud**"  
**9 293 74 Y NANTES**

(ĝirante el eksterlando, aldonu 2  
eŭrojn pli por bankelspezoj)

IBAN:

FR3320041010110929374Y03237  
BIC-kodo: PSSFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Apermonatoj:**

Januaro, marto, majo, julio,  
Septembro, novembro.

**Redaktofino:**

Ĉiam la 10-an de la antaŭa monato

**Presejo:**

Generaldirekcio de MAV  
Andrássy út 73/75  
HU-1062 Budapest, Hungario

**"www.ifef.net"**

ISSN 1397-4270  
VIG 2003.494

**Faka komisiono**

GV: Jan Niemann  
"niemann@kabelmail.dk"  
SK: D-ro Heinz Hoffmann  
"Hoffmann-IFEF@t-online.de"  
SK: Inĝ Ladislav Kovář  
"ladislav.kovar@worldonline.cz "

**PARTOPRENU LA VENONTAN  
SKISEMAJNON**

La 49-a IFES okazos en Braŝovo /RO, de la  
23-a de februaro ĝis la 1-a de marto 2008!

Ronde de Braŝovo estas multaj allogaj ski-  
terenoj kaj krome ne mankas ŝancoj por ceteraj  
programeroj!

Konante la urbon/regionon kaj la lokan E-  
movadon mi nur povas rekomendi mult-  
nombran partoprenon. Lastjare, ankaŭ la ne-  
skiantoj (ankaŭ mi ne plu skiadas) vere ĝuis la  
proponitan programon.

Nia vic-ĉefkomitatano, d-rino Rodica  
TODOR, jam lastjare sukcesis realigi la semajnon  
novstile "Amikecan Vintran Sportferiadon",  
kiu inkludis "sportan" turismon kaj kulturajn  
aranĝojn, koncerne la vintron! Aliĝiloj aperos  
senprokraste. Fine ni dankas niajn rumanajn  
geamikojn, kiuj denove savis IFES-on last-  
momente!

Do karaj, ek al la 49-a IFES!

*Martin Stuppniĝ*

(pliaj informoj kaj aliĝilo kuŝas en paĝoj 6,7,8)



**INTERNACIA  
FERVOJISTO**  
2008.1

**60-a Internacia Fervojista  
Esperanto - Kongreso**



**Pollando, Poznano**  
**17-24 majo 2008**



*La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn*

**Fervoja Koresponda Servo**  
S-ro Dan-Drăgos ALDEA  
Sos. Nicolai Titulescu 14, B1 21, Ap 69  
RO-78152 Bucuresti  
Retadreso: esperdragos@yahoo.com  
*Se vi deziras uzi la servon, bonvolu indiki viajn  
nomon, aĝon, adreson, en kiuj landoj vi deziras  
korespondant(in)ojn, kaj pri kiaj temoj ktp.*  
*Aldonu, se eble, internacian respondkuponon.*



Mi profitas la okazon por, je la nomo de la IFEF-estraro, deziri al vi kaj al via familio, feliĉan sukcesplenan novan jaron kaj esperi multnombrajn partoprenontojn okaze de nia internacia kongreso en Poznano.

~~~~~

### Redaktora jarraporto 2007

En 2007 nia eldonaĵo "Internacia Fervojisto" aperis kvinfoje. Ĝi konsistis el ses numeroj (unu duobla) kun 104 paĝoj (16 pliaj paĝoj rilate lastan jaron).

Mi vere dankas la verkantojn, kiuj, la tutan jaron, provizis diversajn interesajn artikolojn por la revuo. Denove mi bezonas kaj petas vian kunlaboron

Mi ankaŭ deziras danki nian revizianton, Albert Gestin, kiu, jam de pluraj jaroj, strebas por ke nia revuo estu plej eble sen erara.

Por la jaro 2008 mi provos plenumi mian redaktoran taskon kaj akurate liveri interesan publikaĵon .

### Frontpaĝe.

Emblemo de nia venonta kongreso en Poznano (Pollando)

#### Enhavo

|                                      |    |                              |    |
|--------------------------------------|----|------------------------------|----|
| Nia venonta kongreso en Pollando     | 3  | Programo de la postkongreso  | 13 |
| Skisemajno en Braŝovo                | 6  | Terminologia angulo (4)      | 14 |
| Aliĝilo de la 60-a IFEF-K            | 9  | Poloj konferencis en Poznano | 15 |
| Provizora programo de la 60-a IFEF-K | 11 | Honorigoj                    | 19 |

#### Honorigoj

Kiam IFEF distingas membron per honora membreco, aŭ per FISAIC-medalo, ni priskribas tion en IF. Sed kiu memoras ĉiujn ricevintojn !

Tial ni jam publikigas liston de nun vivantaj honoraj prezidantoj kaj membroj, honorigoj per FISAIC-medalo kaj membroj de la Honora « Patrona Komitato de IFEF ».

#### Honora Prezidanto

|           |          |      |
|-----------|----------|------|
| Engen Per | Norvegio | Jaro |
|           |          | 1998 |

#### Honoraj Membroj

|                     |            |      |
|---------------------|------------|------|
| Kruse Elfriede      | Germanio   | 1980 |
| Engen Per           | Norvegio   | 1988 |
| Olsen Henning       | Danlando   | 1995 |
| Barnickel Willem    | Germanio   | 1996 |
| De Sutter Lucien    | Belgio     | 1997 |
| Sredić Gvozden      | Jugoslavio | 1997 |
| Rösemann Otto       | Germanio   | 1999 |
| Patay János         | Hungario   | 2000 |
| Glättli Ernst       | Svisio     | 2001 |
| Hartig Heinz-Dieter | Germanio   | 2001 |
| Eggenberger Gertrud | Svisio     | 2004 |
| Schindler Heinz     | Germanio   | 2005 |
| Robiolle Pierre     | Francio    | 2007 |
| Krogstie Per Johann | Norvegio   | 2007 |

#### Honora membro de FISAIC

|                  |        |      |
|------------------|--------|------|
| De Sutter Lucien | Belgio | 1998 |
|------------------|--------|------|

#### Honorigoj per FISAIC-medalo speciala

|                     |            |         |      |
|---------------------|------------|---------|------|
| Geroldinger Johann  | Aŭstrio    | ora     | 1967 |
| Blauw Thies         | Aŭstrio    | arĝenta | 1967 |
| Hunkeler Hans       | Svislando  | bronza  | 1967 |
| Kruse Elfriede      | Germanio   | ora     | 1975 |
| Sredić Gvozden      | Jugoslavio | ora     | 1986 |
| Hartig Heinz-Dieter | Germanio   | ora     | 1988 |
| Robiolle Pierre     | Francio    | ora     | 1994 |
| Engen Per           | Norvegio   | ora     | 1998 |

#### Honora Patrona Komitato de IFEF

|                        |          |                                        |                     |      |
|------------------------|----------|----------------------------------------|---------------------|------|
| Ceci Pasquale          | Italio   | Direktoro de Dopolavoro                | Ferroviano, Bologna | 1970 |
| D-rino Boulton Majorie | Britio   | Universitato                           | Oxford              | 1977 |
| Inĝ Rodak Aleksander   | Pollando | Ĉefdirektoro de la fervoja direkcio de | Katowice            | 1987 |
| Inĝ Vojtěch Zelenka    | Ĉeĥio    | Direktoro de la fervoja direkcio en    | Ĉeĥio               | 2003 |

## Plia informo pri la faka kunveno de la Fervojistoj en Jokohamo

En paĝo 92 de IF n° 2007.6, rilatanta la kontakto-kunvenon de la fervojistoj dum la 92-a UK en Japanio, fine de la teksto estis skribite :

*"Poste, la japanaj fervojistaj esperantistoj planis fakan ekskurson al Tokio. Sed, ĉar la propono ne venis sufiĉe frue, la partoprenantoj jam planis aliajn programojn".*

La prezidanto de JELF (Japana Esperantista Ligo Fervojista) s-ro Osiaka deziras alporti jenajn aldonajojn.

*Li precizigas ke la estraro de JELF frue retroŝtis al IFEF-estraro anoncanta eblecon fari proponon pri faka fervojista programo inkluzive de ekskursoj por kolegoj. Sed UEA ne klare respondis al la demando de la vic-prezidanto de IFEF pri tagordoj de fakaj kunsidoj dum la UK. Kaj ĉio prokrastiĝis, ni preparis nin por la ekskurso sed programoj malfrue fiksitaj malebligis taŭgan fervojistan ekskurson.*

*Pro tio, lastmomente aliaj programoj estis proponataj.*

Osioka Moritaka, Prez. de JELF

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

## Historia libreto okaze de la 100 jariĝo de IFEF

*Jam ekzistas tri historiaj libretoj de IFEF memorigantaj ĝian movadon ĝis la jaro 1999. Sed ĉu ne estus interese kolekti la memoraĵojn de la nuna epoko (1999-2009) kaj eldoni novan historian libron cele al konservi papere la IFEF-okazintaĵojn?*

*IFEF-estraro proponas, tiucele, malfermi fonduson. Pro tio, estus necese havigi sumon de 5 000 € por la realigo de du-tri-centpaĝa dokumento eldonota tri cent ekzemplere.*

*Por ke ni havu kompletan bildon de la IFEF-movado dum 100 jaroj, helpu la realigon de tiu projekto :*

- *per la kolekto de viaj enlandaj arkivoj,*
- *per financa helpo al tiu fonduso (bonvolu sendi monhelpon al nia kasisto kun mencio de la fonduso).*

60-a Internacia Fervojista  
Esperanto - Kongreso



Pellandc, Peznane  
17-24 majo 2008



Nia venonta 60-a IFEF-kongreso  
en Pollando

Iom da historio pri la urbo Poznano

**Poznań** (esperantigo *Poznano*) estas la ĉefurbo de la provinco Grandpollando en Pollando. Ĝi situas ĉe la rivero Varto kaj havas 590 000 loĝantojn. Ĝi havas statuson de urbo de la 13-a jarcento, kaj apartenis al Prusio de 1793 ĝis 1918 kaj al Germanio inter 1939 - 45.

En julio 1956, la laboristoj ribelis kontraŭ la komunismo, tio kio estis sange subpremita.

La historio de Poznano apartenas al unu el la plej malnovaj en Pollando. Nome, la unuaj migrantaj ĉasistoj komencis setli tie, jam de pli ol 8 mil jarojn antaŭ nia erao. Dum jarcentoj, la regionon jen kaj jen celis laŭvicaj hom-grupoj, alportante ĉiam pli novajn kutimojn kaj vivmanierojn. Sufiĉas diri, ke nun en la urbo, arkeologoj laboras en pli ol 100 foscentroj. Bedaŭrinde, tra la regiono ne kondukis la romia sukcesa itinero aŭ aliaj gravaj trakoj, tial temas verdire pri loko iom provinca.

Tio tamen ne signifis nur mal-avantaĝojn. Ĝuste, la provinca situo



Urbodomo de Poznano

de la regiono kaŭzis, ke damaĝis ĝin nek la migrantaj el la okcidento al la oriento keltoj, nek la migrantaj el la nordo al la sudo de la eŭropa kontinento gotoj. La loka komerco disvolviĝis malrapide, sed senĉese. Ĝian ekziston ĉesigis nur invadoj de Hunoj, kiuj superlavangis la regionon dum la

5-a jarcento. Veran renaskiĝon de la regiono kaj establaron de setlejo, el kiu evoluis Poznano, alportis nur la 9-a jarcento. Temas pri Ostrów Tumski – la rivera insulo de Warta. Malpli ol 100 jaroj pli poste, ĝi fariĝis unu el la plej gravaj lokoj en la kreiĝanta ŝtato de princo Mieszko la 1-a, opiniata la unua reganto de Pollando. Tre rapide, la urbo disvolviĝis, grandparte pro la situo najbare de la germana imperio. Ĝuste kun ĝi, la unuaj regantoj de Pollando estis plej proksime ligitaj. Pri la tiama graveco de Poznano povas atesti la fakto, ke laŭ la arkeologiaj esploroj, ĝi estis la plej bone fortikigita urbo en la ŝtato de Mieszko la 1-a.

En la jaro 966, kiam okazis la bapto de tiu ĉi pola princo, komenciĝis la skriba historio de Pollando. Necesas aldoni, ke precize Poznano estas opiniata de sciencistoj kiel verŝajna loko de tiu ĉi bapto. Atestas pri tio, interalie la fakto, ke en Poznano estis malkovritaj antaŭnelonge restaĵoj de kastelo, la plej granda masonita konstruaĵo en la tiama Pollando. Oni supozas, ke apudis ĝin la tn. kapeleto de Dąbrówka – la edzino de Mieszko la 1-a. La arkeologiajn esplorojn malfaciligas la fakto, ke la restaĵoj troviĝas sub la preĝejo de Dipatrino, daŭre funkcia kaj vizitata de religiuloj. Tamen, arkeologoj ĉiam pli kuraĝe supozas, ke Poznano ne nur rolis kiel loko en kiu komenciĝis la simbola kristanigo de nia lando - pro la bapto de la reganto, sed ke ĝi estis la unua ĉefurbo de Pollando.

La unua episkopo de Pollando, Jordan, sian sidejon havis en Poznano

en la Katedralo de Sankta Petro troviĝanta sur la jam menciita insulo Ostrów Tumski. En la sama preĝejo estis entombigitaj princo Mieszko la 1-a kaj poste lia filo Boleslao la Brava – la unua reĝo de Pollando. La katedralo fariĝis loko de la eterna ripozo ankaŭ por laŭvicaj reĝoj de Pollando. La lasta estis tie entombigita en la 1296-a jaro Przemysław la 2-a. Valoras menci, ke li mem enkondukis la blankan aglon kiel la blazonon de Pollando. Kiel skribis la unua pola kronikisto Gall Anonim, la jaroj post la morto de Przemysław la 2-a alportis kaoson al la juna pola ŝtato. Rezulte de ĝi, homoj revenis al la paganaj ritoj kaj en la katedralo de Sankta Petro ekloĝis sovaĝaj bestoj, sed ne por longe. La katedralon post neplena jarcento oni rekonstruis kaj ĝi denove fariĝis la episkopa sidejo. Sed, Poznano ne plu multe gravis. En la 1320-a jaro, la oficiala ĉefurbo de Pollando fariĝis Krakovo. Poznano do devis lasi la sonĝojn esti la koro de la lando kaj ĝi devis okupiĝi pri komerco, ankaŭ kun tiom foraj regionoj kiel Arabio. Ene de la ĉirkaŭita per la defendoremparego urbo la vivo brile evoluis. Poznano estis agnostika kiel urbo jam meze de la 13-a jarcento. El la sama periodo devenas la difino de la ĉefa urba foirplaco. Ĝia spaco okupis eĉ 2 hektarojn, kio signifis entute dekonon de la urba spaco. La grandeco gravis, ĉar ĝuste sur tiu teritorio okazis, ĉiun merkredon, bazaro. Pri pli grandaj fieris nur Gdansko kaj Krakovo. Malgraŭ tio, ke en Poznano ne plu loĝis reĝoj, ĝi daŭre apartenis al

In memoriam

## Ludoviko SEKEREŜ



La 22-an de oktobro 2007 forpasis nia elstara E-aktivulo Ludoviko Sekereŝ (Szekeres Lajos) el la urbo Senta en Vojvodino, Serbio. Li naskiĝis en la jaro 1927 en Sombor. Post studjaroj li en 1955 fariĝis trafikingeniero pri fervojoj kaj oficis en Fervoja Direkcio en Novi Sad, poste en provinca sekretariato pri urboplanado, spacplanado kaj protektado de vivmedio. Li laboris je projektado de pluraj fervojstacioj kaj fervojnodoj. Post pensiuliĝo en 1992, li translokiĝis al la urbo Senta en 1997.

Li esperantistiĝis en 1948 kaj ĉiam aktivis en diversaj kampoj, precipe ĉe fervojo. Li fondis plurajn fervojistajn E-societojn. Lia ĉefa agado estis prilaboro de fervoja E-terminaro, kunlaboro en Terminara leksikono. Kun Josip Zupanić li verkis kaj en 1971 eldonis Fervojan Terminareton Esperanto–Serbokroata / Serbokroata-Esperanto.

Ekde 1973 li agis en Terminara komisiono de IFEF kaj kontribuis je difinoj por pli ol 13 mil fervojaj E-nocioj. Li verkis E-lernolibron ESZPERANTO NYELVKO\*\*NYV (E-lernolibro por kursoj, lernejoj kaj memlernantoj, eldonita en 2000), gvidis multajn E-kursojn, verkis grandan nombron da fakaj kaj alispecaj artikoloj, reviziis multajn E-tekstojn kaj agis en diversaj E-funkcioj. POR MERITOJ li ricevis plurajn diplomojn de diversaj Esperanto-organizaĵoj.

La forpaso de Ludoviko prezentas grandan perdon por la nacia kaj internacia E-movadoj.

Li restu profunde en nia memoro. Gloron al vi, Ludoviko!

**Fine de la jaro 2007 forlasis nin du elstaraj  
fervojistaj esperantistoj.  
Temas pri niaj amikoj Friedrich TSCHOM kaj  
Ludoviko SEKEREŜ.  
IFEF kondolencas ilian familion.**



Dipl.Inĝ. **Friedrich TSCHOM** mortis la 17-an de novembro 2007 post longa malsano de haŭto. Li aĝis 82 jarojn.

Antaŭ la fondiĝo de AFEF, s-ro Dipl.Inĝ. Tschom estis la estro de la "Fervojista Esperanto Fakgrupo Aŭstrio" kaj en novembro 1956 la redaktorto de la unua numero de "Bulteno"

Li estis dum jardekoj la estro de la Fervojista Esperanto-Asocio Linz kaj kunlaboris en tiu ĉi funkcio ĉe multnombraj naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj.

Same, li partoprenis, kiel reprezentanto de Aŭstrio, internaciajn kongresojn en tuta Eŭropo.

Li verkis fakprelegojn pri instalaĵoj de la Aŭstria Fervojo kaj estis aktiva kunlaboranto de la Terminara Komisiono de IFEF.

Kaj ĉefe menciinde estas, ke li dum multaj jaroj gvidis Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresintoj en Linz.

Sinjoro Dipl.Inĝ. Tschom restas por nia movado neforgesebla kaj ne anstataŭebla.

la ĉefaj urboj de Pollando. Atestas pri tio, interalie la fakto, ke ĝuste ĝi kune kun Krakovo devis aprobi ĉiujn subskribitajn pactraktatojn inter la pola ŝtato kaj la Teŭtona Ordeno. En la 15-a jarcento oni ĉirkaŭis Poznanon per aldona defendo-remparego kun 35 turetoj, inkluzive la plej grandan, nomatan la horloĝa. Kaj kun la horloĝo kaj Poznano, entute nedisigeble ligiĝas la t. n. poznanaj kapridoj, vaste rekonataj kiel la simbolo de la urbo.



*Kapridoj sur la urbodomo*  
sukcesis eskapi el la kuirejo kaj ili subite ektroviĝis sur la tegmento de



#### *Ĉefa placo en Poznano*

Laŭ onidiroj, kiam Majstro Bartolomeo finis la laborojn koncerne la turhorloĝon, kiun oni volis instali ĉe la urbodomo, li invitis la urbokonsilantaranojn por ĝia prezentado. Tion neatendite partoprenis ankaŭ vojevodo. Majstro Bartolomeo ordonis do al kuiristo prepari apartan regalon. Tamen tiu ĉi ne estis aparte zorgema persono kaj la ĉefa plado estis rostbruligita. Li do decidis ŝteli du kapridojn kaj rapidis ilin prepari anstataŭ la bruligita viando. La kapridoj tamen

la urbodomo. Tie ili komencis interfrapi sin per la kornoj, kio multe amuzis la urbokonsilantojn kaj urboloĝantojn. La batalemaj kapridoj vekis ankaŭ bonan humoron de la vojevodo, kiu senkulpigis la kuiriston pri la ŝtelo kaj ordonis al Majstro Bartolomeo aldoni al la prilaborita horloĝo kapridfigurojn, kiuj frapetas sin per la kornoj. La ordono de la vojevodo evidente devis esti plenumita kaj kapridoj ĝis hodiaŭ tagmeze elkuras el la horloĝo, situanta sur la turo de la urbodomo por reciproke interŝanĝi kornofrapetojn. Tio same hodiaŭ kiel antaŭ jarcentoj kaŭzas ĝojon de la poznananoj, kaj ankaŭ de turistoj, kiuj gape admiras la simbolon de la urbo

*El Wikipedia*



## Terminologia angulo (4)

Pro internacia uzo de novaj – pleje teknikaj – kreaĵoj (produktoj) kadre de tutmondiĝo, oni mondvaste nomas la produktojn preskaŭ nur per anglaj mallongigoj, kiuj en la koncerna fakularo estas pli konataj ol eventualaj tradukoj.

Por terminologie trakti la problemon, komence necesas distingi inter

unue: nocio / difino / termino

due: konkreta produkto / produkto-priskribo / produktномо

Propraj nomoj ne estas tradukendaj. Sekve, ankaŭ en Esperanto-tekstoj aperu iliaj mallongigoj senŝanĝe. Oni laŭtleĝu ilin unuoplitere. Komprenble, ĉiu tia konkreta produkto apartenas al difinebla nocio kun termino. Por fakaj Esperanto-tekstoj ni preferu, unuamencie enigi kaj la Esperanto-terminon kaj la anglan mallongigon (la lastan kursive). Ĉe sekvaj mencioj, pleje sufiĉas la nura mallongigo. La tekstmotivo decidus, ĉu necesas aldoni la tutan anglan produktномо aŭ / kaj la produkto-priskribon, kiu estas pli detala ol difino.

Fervoja ekzemplo estas tre vasta nocio n-ro 11238 kun la termino „komandosistemo por ekspluatado”. *UIC* aldonis la difinon:

Tuto de ĉiuj tri hierarkiaj niveloj de fervoja sistemo:

(a) planado kaj administrado,

(b) dispozicio kaj

(c) operaciado kun regado kaj sekurigo de veturvojoj kaj veturiloj.

Speciale por estonta tuteŭropa uzo, kelkaj fervojaj entreprenoj komune konceptis koncernan sistemon kun la mallongigo *ERTMS* el la angla produktномо *European Rail Traffic Management System*.

Por fakaj Esperanto-tekstoj menciataj tiun sistemon, estas rekomendata la vortigo

- ĉe unua mencio en teksto: „(eŭropa) komandosistemo por ekspluatado *ERTMS*” (kun aŭ sen indiko de la kompleta angla nomo),

- poste, pli koncize: „komandosistemo *ERTMS*”, „sistemo *ERTMS*”, aŭ nur „*ERTMS*”.

Sciu ke la koncepto *ERTMS* temas ne pri iu ajn komandosistemo por ekspluatado, sed pri konsisto el klare determinitaj komponantoj.

Heinz Hoffmann  
sekretario de IFEF-Terminara Sekcio

## 49-a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno BRAȘOVO - RUMANIO Montaro POSTAVARUL 23.02 - 01.03.2008

### Kontaktadreso:

- S-ino Rodica TODOR poŝtel: 040 722 792849 rete: [rodica\\_todor@yahoo.com](mailto:rodica_todor@yahoo.com)  
- S-ro Constantin MARCU hejma adreso:  
str. Zizinului nr. 65, bl. S 22, sc. D, ap. 2, 500403 Brasov, Romania  
rete: [ela\\_net45@yahoo.com](mailto:ela_net45@yahoo.com) aŭ [tour\\_esper@excite.com](mailto:tour_esper@excite.com)

Bankkonto en Eŭro: **RO 34BRDE080SV18632950800**  
**pt. As. Feroviarilor Esperantiști ,str. Politehnicii 1, Brașov Bv-ROM**

### KOTIZOJ:

|                                                             | ĝis la 31.12.07 | ekde 01.01.08 |
|-------------------------------------------------------------|-----------------|---------------|
| - aliĝkotizo                                                | 20 EUR          | 30 EUR        |
| - aliĝkotizo por partoprenantoj el la ekssocialismaj landoj | 10 EUR          | 15 EUR        |

Estos disponeblaj unu-, du- kaj trilitaj ĉambroj .

**Prezoj por tutsemajna (7 taga) restado (tranoktado+matenmanĝo), en la hoteloj POSTAVARUL kaj COROANA, dependas de la kvalito de la hotelo.**

La menciitaj hoteloj situas unu ĉe la alia **en la urbocentro** kaj estas facile atingeblaj de la ĉefa stacidomo per buslinioj **4 kaj 51**. De la bushaltejo "**Primarie**" (esperante - "Urbodomo"), necesas 5 minutoj por atingi la hotelojn, post traire de la Centra Parko.

**Hotelo "COROANA", dustela, havas unu- kaj dulitajn komfortajn ĉambrojn, ekipitajn per kablo-televido, telefono, duŝejo kaj necesejo.**

|                              |                                 |
|------------------------------|---------------------------------|
| <b>Prezo: unulita ĉambro</b> | <b>36 EURO (kun matenmanĝo)</b> |
| <b>dulita ĉambro</b>         | <b>26 EURO ( „ „ „ „ )</b>      |
| <b>po nokto/po persono</b>   |                                 |

**Hotelo "POSTAVARUL", unustela, havas unu-, du- kaj trilitajn komfortajn ĉambrojn (kun varma kaj malvarma akvo, telefono, necesejo).  
Duŝejoj troviĝas en la koridoro.**

|                                |                          |                                 |
|--------------------------------|--------------------------|---------------------------------|
| <b>Prezo por unu persono :</b> | <b>unulita ĉambro</b>    | <b>18 EURO (kun matenmanĝo)</b> |
|                                | <b>du/trilita ĉambro</b> | <b>15 EURO ( „ „ „ „ )</b>      |

Ĉiuj hoteloj ofertas, laŭ la elekto, **duon- aŭ kompletan pensionon.**

**Senpaga inter-reta konekto.**

Por kromaj informoj pri la urbo Brașovo kaj proponitaj loĝeblecoj, eblas konsulti:  
[www.Brasovcity.ro](http://www.Brasovcity.ro)  
[www.aro-palace.ro](http://www.aro-palace.ro)

**Ĝeneralaj instrukcioj:**

Bv. plenigi tajpe aŭ preslitere kaj legeble apartan aliĝ-ilon kaj sendi ĝin al la adreso de s-ro **Constantin MARCU**.

Estas rekomendite skribi familian nomon majuskle kaj personan nomon minuskle.

**La aliĝiloj povas ankaŭ esti senditaj per ret-mesago.**

Organizantoj ne respondecas pri asekuro de la partoprenantoj. San-asekuron devas esti kontrakti **hejme**.

**Limdato por aliĝi: la 31-a de Januaro 2008.** Post tiu ĉi limdato, la aliĝiloj estos traktataj sen garantio.

**Atingebleco:**

Eblas uzi internaciajn trajnojn: Dacia (de Vieno), Ister (de Budapeŝto), Pannonia (de Praha), Carpati (de Krakovo). Eblas flugi al Bukuresto kaj de tie, trafi trajnon aŭ buson ĝis Braŝovo. La ĉefa stacidomo situas unu kilometron for de la hoteloj. **Kondiĉe de via anonco de la alveno, vi estos akompanataj.**

**Skieblecoj:**

Oni proponas plurajn skicentrojn: Poiana Braŝovo (13 km-ojn, atingeblan per buso), Predeal (24 km-ojn, atingeblan per trajno kaj buso), Azuga (32 km-ojn, atingeblan per trajno kaj buso), Sinaia (40 km-ojn, atingeblan per trajno kaj buso).

La plej proksima skicentro, Poiana Braŝovo, disponas pri skiterenoj por komencantoj kaj spertuloj, kiuj estas inter 300-4000 metrojn longaj kaj pri padoj 4500 metrojn longaj por longdistancaj skiantoj.

En ĉiuj proponitaj skicentroj servas skiliftoj, seĝliftoj, pruntejoj de materialoj por skiado, k.t.p.

**Programeblecoj:**

**La programo komenciĝas sabate, la 23-an de februaro, per interkona vespero (18.00h) kaj finiĝas sabate, la 01-an de marto, post matenmanĝo.**

La organizantoj proponas kutimajn skisemajnajn programerojn vintrajn kaj kulturajn kiuj dependos de la nombro de la partoprenantoj.

Por la elekto de la partoprenantoj, jen kelkaj vidindaĵoj :

- la urbo **Braŝovo** - la urbo-fortikaĵo ĉe la malsupro de monto Tâmpa (960 m).

- **la Kastelo Bran** troviĝanta 30 km-ojn sude de Braŝovo. Ĝi famas pro ĝia beleco kaj la ĉirkaŭanta pejzaĝo, sed ĝia famo ligiĝas precipe al la legendo de la Grafo Drakula, kies etoso ankoraŭ hantas ĉi-tiujn praaajn regionojn,

- la fama reĝa **Kastelo Pelés** - la ĉefa pitoreskaĵo de la urbo Sinaja (40 km).

- la urbo **Sigiŝoara (100 km)** - atestita ekde la jaro 1191. Ĝi estas la ununura fortikaĵo seninterrompe enloĝata ĝis nun. La remparo tre bone konservita kaj la malnovaj stratetoj kaj domoj ege pitoreskaj beligas la urbon.

- **la salminejo Slanic-Prahova kaj la Muzeo de la ĉasado Posada.**

- la supro de la **Montaro Bucegi**, per telfero ĝis alteco de 2000 metroj.

Pro la riĉa programo, la urbo elektita konvenas por ĉiuj aĝkategorioj, por skiantoj, sed ankaŭ neskiantoj - ĉar la regiono estas unu el la plej famaj ripozlokoj en Rumanio - .

Nia konsilo estas akcepti la **INVITON** partopreni la 49-an Skisemajnon de IFEF en mirinda regiono de Sud-Orientaj Karpatoj.

**Enkadra programo de la Postkongreso de la 60-a IFK (Malborko kaj Bjalistoko)****Sabaton la 24-an de majo 2008**

7.00 - matenmanĝo

8.00 – forveturo el Poznano per busoj

10.00 -10.30 Strzelno –mallonga paŭzo kun vizitado en romanikstila templo

12.00 – 15.30 tagmanĝo kaj vizitado de la malnova urbo *Toruno*

18.00 alveno al Malborko kaj enloĝiĝo en la hotelo

19.00 vespermanĝo

*vespere libervola programo – ebla partopreno en vespera aranĝo „ lumo kaj sono” sur la kruckavalira kastelo en Malborko.*

**Dimanĉon la 25-an de majo 2008**

8.00- matenmanĝo

9.00 – solena malfermo de memortabulo de IFEF kaj plantado de kverko

10.00-12.00 vizitado de kruckavalira kastelo en Malborko kun ĉiĉerono

1300 - tagmanĝo

14.00 – forveturo al Gdansko

15.00 Gdansk Oliwa – vizitado de la katedralo kaj partopreno en orgena koncerto

16.00-19.00 – vizitado de la malnova urbo de Gdańsko (vizitado de la ĉefaj monumentoj en la Longa Foirplaco)

20.00 – vespermanĝo en Malborko

**Lundon la 26-an de majo 2008**

7.00 matenmanĝo

7.30 forvojaĝo el Malborko

11.00 – 13.00 Olsztyn – vizitado de la malnova urbo kaj tagmanĝo

14.00 Szczytno – vizitado de la kastelo

17.00 mallonga vizitado en Tykocin kaj en la fama sinagogo

19.00 Bjalistoko – loĝiĝo en la hotelo „Polesie” kaj vespermanĝo.

Poste renkontiĝo kun bjalistokanoj, koncerto en la kafejo FAMA

**Mardon la 27-an de Majo 2008**

8.00 matenmanĝo

9.00-10.00 vizitado de la palaco de Branicki

10.00-12.00 vizitado de la Muzeo de ikonoj en la apuda urbeto Supraśl

13.00 tagmanĝo – 40zl por unu persono

14.00 -17,00 urbrigardado kun la ĉiĉerono

18.00 vespermanĝo

19.00 vespera renkontiĝo kun bjalistokanoj

**Merkredon la 28-an de Majo 2008 (lasta tago - forvojaĝo)**

7.00 matenmanĝo

8.00 – forveturo el Bjalistoko

12.00 Varsovio PKP – Warszawa Centralna

12.30 Varsovio-flughaveno Okęcie




ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1. Ĉiu partoprenanto plenigu kaj sendu apartan aliĝilon por la kongreso kaj por la postkongreso al la adresoj de LKK. Ankaŭ familianoj sendu apartan aliĝilon kaj indiku reciproke la parencon rilaton.
2. Skribu majuskle kaj preslitere aŭ tajpe, donante ĉiujn petitajn detalojn.
3. Sendu la pagon al la indikita bank-konto plej malfrue ĝis la 28-a de februaro 2008.
4. LKK povos trakti la aliĝon nur post la alveno de la pago.
5. La prezo estas en eŭroj. LKK akceptas la pagon en eŭroj aŭ en polaj zlotoj laŭ valut-kurso de dato de la enpago .
6. La partoprenantoj el la "eks-socialismaj landoj" pagos saman kotizon kiel simpatiantoj. IFEF-membro, ne IFEF-membro, familiano kaj junulo pagos same (25 eŭrojn ĝis 31.01.2008, respektive 30 eŭrojn ekde la 1-a de februaro 2008).
7. Se vi pagas por alia persono (kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon!), menciuj la ĝustajn detalojn pri la koncerna persono (nomo, lando, adresoj).
8. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenas la kongreson. La antaŭpagitaj sumoj estos repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 15-a de aprilo 2008.
9. *LKK havas la rajton rezervi la sam-kategorian ĉambrom en alia hotelo, se la mendita kategorio elĉerpiĝis ĝis la alveno de la mendo de la aliĝinto- alpago aŭ elpago en akceptejo de IFK.*
10. LKK akceptas la ĉambromendon, se la ĉambroperado kaj la prezo de unu tranoktado estas pagitaj. LKK traktos la ĉambromendon sen garantio, se ĝi alvenos post la 1-a de marto 2008.
11. LKK konfirmos la ricevon de aliĝilo kaj pago per konfirmltero. Nepre kunportu ĝin al la kongreso! La nomŝildon oni ricevos dum la registrado ĉe la alveno. La nomŝildon oni ne rajtas vendi, transdoni aŭ interŝanĝi.
12. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezon, se la inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj devigos tion.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

**Nova adreso de Kataluna Esperanta Fervoŝista Asocio**

Post deviga ŝanĝo, jen la nova adreso de **Kafa** : **Retadreso de Kafa** :  
**Kataluna Esperanta Fervoŝista Asocio** esperfervojo@yahoo.es  
**Estacio Renfe Sant Andreu Arenal**  
**Avda Meridiana s/n.**  
**08030 BARCELONA**  
**KATALUNIO HISPANIO**



Kongresa n-ro

**ALIĜILO**

Por la 60-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervoŝista Esperanto-Federacio) aranĝita de PEFA inter la 17-a kaj 24-a de majo 2008 en Poznań, Pollando  
**Poŝta adreso de LKK:**

Dom Kultury "Kolejarz" Al.Niepodległości 8A  
 PL 61-875 Poznań Tel: +48 601703231 fax +48 61-6331595

**Bank-kontoj:** Stowarzyszenie KSTiK "Kolejarz" ul.Hoza 63/67, 00-681 Warszawa  
**Bank Millenium Biznes** BIG Bank Gdański S.A. Al. Jerozolimskie 123, 02-017 Warszawa  
 SWIFT CODE: BIGBPLPW NO: PL98116022020000000086472212 *(en eŭroj)*  
 por pagoj en zloty(PLN) 51 1160 2202 0000 0000 3369 2254  
 retadreso: pefa@op.pl reta hejmpaĝo: [www.pefa.pl](http://www.pefa.pl)

Signu per kruco en la kvadrato(j), se jes:

S-ro  S-ino  Vegetarano  Handikapulo  IFEF-membro

familia nomo:.....*prononco laŭ espeperanta alfabeto*.....  
 antaŭnomo : ..... naskiĝjaro .....  
 strato kaj numero : .....  
 lando : ..... poŝtkodo kaj loĝloko : .....

Samtempe (aparte aliĝinta): filo/-ino  edzo/-ino  patro/-ino

Nomo (j) kaj antaŭnomoj(j) : .....

| Kongreskotizoj                                                 | ĝis 31.01.2008 | ekde 01.02.2008 |       |
|----------------------------------------------------------------|----------------|-----------------|-------|
| Kongresano (IFEF-membro):                                      | € 50           | € 60            | ..... |
| Familiano kaj junulo/ino ĝis 30 jaraĝa:                        | € 25           | € 30            | ..... |
| Kongresano (ne IFEF-membro):                                   | € 60           | € 70            | ..... |
| Simpatianto k.                                                 |                |                 |       |
| (ankaŭ v. en la Ĝenerala Instrukcio n-ro 6):                   | € 25           | € 30            | ..... |
| <b>Servoj</b>                                                  |                |                 |       |
| Ĉambro-perado:                                                 |                | € 2             | ..... |
| Tranoktadkosto por unu nokto laŭ elektita kategorio (deviga!): |                |                 |       |
| Urbovizitado D1: Poznań                                        |                | € 3             | ..... |
| Duontaga ekskurso D2 (Wolsztyń):                               |                | € 20            | ..... |
| Duontaga ekskurso D3 (Kórnik ):                                |                | € 20            | ..... |
| Tuttaga ekskurso T1 (Gniezno-Biskupin- Venecja kun tagmanĝo):  |                | € 45            | ..... |
| Bankedo kun la balo:                                           |                | € 20            | ..... |
| Krompago por .....                                             |                |                 |       |

**Sume** .....

Loko , dato: .....

Subskribo: .....

Kongresa n-ro 

## Ĉambro-mendilo

Por la 60-a Kongreso de IFEF ( Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) aranĝita de PEFA inter la 17-a kaj 24-a de majo 2008 en Poznano , Pollando

Sinjoro  aŭ Sinjorino 

familia nomo: .....

antaŭnomo : ..... strato kaj numero: .....

lando, poŝtkodo kaj loĝloko : .....

Mi deziras loĝi en la sama ĉambro kun .....

Nomo : ne gravas 

Mi mendas ĉambrojn de la.....-a majo ĝis la..... -a de majo 2008; en hotelo :  
(Signu per kruco en la kvadratoj)

| 16/17                    | 17/18                    | 18/19                    | 19/20                    | 20/21                    | 21/22                    | 22/23                    | 23/24                    |
|--------------------------|--------------------------|--------------------------|--------------------------|--------------------------|--------------------------|--------------------------|--------------------------|
| <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> | <input type="checkbox"/> |

**La prezoj estas por unu nokto por unu persono kun matenmanĝo**  
Bonvolu signi la elekton per kruco en la kvadrato ( j )

|                                   | apartamento                    | unu-lita                       | du-lita                                 | pli lita          |
|-----------------------------------|--------------------------------|--------------------------------|-----------------------------------------|-------------------|
| Hotelo Mercure****                | € 250 <input type="checkbox"/> | € 115 <input type="checkbox"/> | € 72 <input type="checkbox"/>           |                   |
| Hotelo Lech***                    |                                | € 42 <input type="checkbox"/>  | € 32 <input type="checkbox"/>           |                   |
| Hostel Frolic Goast (amas loĝejo) |                                |                                | € 17 (4 lita) <input type="checkbox"/>  | ( kun matenmanĝo) |
|                                   |                                |                                | € 11 (10 lita) <input type="checkbox"/> | ( kun matenmanĝo) |

Mi alvenos al Poznano

per (trajno, aŭtomobilo, aviadilo ktp): la ..... -an de majo 2008 , ĉ. la.....-a horo

Mi deklaras, ke mi havas propran san- kaj akcident-asekuron por mia restadtempo en Pollando dum la 60-a IFEF-kongreso.

dato .....

subskribo .....

## PROVIZORA PROGRAMO de la 60-a IFK en Poznano

|                          |       |                                                                                                                     |
|--------------------------|-------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>16.05.08 vendredo</b> | 13.00 | Informejo, akceptejo (DKK- Kulturdomo de Fervojisto Al. Niepodległości 8A)                                          |
| <b>17.05.08 sabato</b>   | 8.00  | Akceptejo, informejo (DKK)                                                                                          |
|                          | 14.00 | Gazetara konferenco                                                                                                 |
|                          | 16.00 | Kunsido de la IFEF-estraro kaj de LKK (DKK)                                                                         |
|                          | 20.00 | Interkona vespero                                                                                                   |
| <b>18.05.08 dimanĉo</b>  | 8.00  | Akceptejo, informejo, libroservo                                                                                    |
|                          | 9.30  | Solena malfermo (salonego NOT ul. Wieniawskiego 5/7)                                                                |
|                          | 12.00 | Komuna fotado                                                                                                       |
|                          | 14.00 | Duontaga promenado tra urbocentro de Poznano - D1                                                                   |
|                          | 14.00 | Faka komisiono                                                                                                      |
|                          | 17.00 | Sankata Meso                                                                                                        |
|                          | 20.00 | Nacia vespero (NOT)                                                                                                 |
| <b>19.05.08. lundo</b>   | 8.00  | Informejo, libroservo                                                                                               |
|                          | 9.00  | Komitata kunveno nepublika (DKK)                                                                                    |
|                          | 13.30 | Duontaga ekskurso trajne al Wolsztyn - D2                                                                           |
| <b>20.05.08 mardo</b>    | 8.00  | Informejo, libroservo                                                                                               |
|                          | 9.00  | Plenkunsido publika ( NOT)                                                                                          |
|                          | 13.30 | Faka komisiono                                                                                                      |
|                          | 16.00 | Prezentado de venonta 61-a IFK                                                                                      |
|                          | 19.00 | Kultura vespero (NOT)                                                                                               |
| <b>21.05.08 merkredo</b> | 8.30  | Tuttaga ekskurso al Lednica, Gniezno, Biskupin kaj Wenecja (muzeo de etŝpuraj fervojoj) laŭ Piast-reĝa itinero - T1 |
| <b>22.05.08 ĵaŭdo</b>    | 8.00  | Informejo, libroservo                                                                                               |
|                          | 9.00  | Fakaj prelegoj (DKK)                                                                                                |
|                          | 14.00 | Duontaga ekskurso al kastelo Kórnik - D3                                                                            |
|                          | 20.00 | Bankedo kaj internacia balo                                                                                         |
| <b>23.05.08 vendredo</b> | 8.00  | Informejo, libroservo                                                                                               |
|                          | 9.00  | Movadaj aferoj (DKK)                                                                                                |
|                          | 10.00 | Faka komisiono (DKK)                                                                                                |
|                          | 15.00 | Solena fermo de la 60-a kongreso -NOT.                                                                              |
|                          | 20.00 | Adiaŭa vespero                                                                                                      |
| <b>24.05.08 sabato</b>   |       | Hejmenveturado, postkongreso.                                                                                       |